

## En la inferon kun la artefaritaj lingvoj!

La ICI (Berlina Instituto por Kultura Esploro) rigardas sin garantiulo de estetiko ĉe delikataj diskutoj pri kulturlingvoj. Tiele je la 23a de februaro 2016 en aranĝo pri „Multlingva Eŭropo“. Ĉiuj „naturaj“ lingvoj estis rigardataj kiel valoraj en la senco de la kulturo, sur kiu ili baziĝas. Kontraste al tio „planlingvo“ estis kondamnita kiel „artefarita“, en ĝi la homo laŭdire ne povas bonfarti.

Sed kio efikas artefarite, kio „estas“ artefarita? Ĉu pri tio decidas la homo per sia konduto? Aŭ per antaŭjuĝoj? En la aranĝo oni ne senplezure aŭskultis la eldirojn de dipl.inĝ. Peter Kühnel, kiu koncize ilustris, kiamaniere oni povus, politike kaj individue, interrilati pli pace en Eŭropo, se la naciaj polarigoj kaj tensioj finfine estus mildigataj per neŭtrala lingvo – lingvo, kiu jam delonge pruviĝis taŭga kaj preciziĝis en la ĉiutaga vivo.

La reago: konsternitaj vizaĝoj. Nome oni antaŭe parolis pri tio, ke la t.n. „Globalesisch“, speco de ĉiam pli kaj pli simpliĝanta angla, estas ĉagrenaĵo; vd. ankaŭ: Jürgen Trabant: „Globalesisch oder was? Ein Plädoyer für die Sprachen Europas. (Globalesisch aŭ kio? Pledo por la lingvoj de Eŭropo“, C.H. Beck Verlag 2014).

„Artefarita“ lingvo – tiel oni klasis la ĉe ICI vastskale nekonatan Esperanton – estis sentata kiel minaco. Flanke de estetikuloj: la prelegoj ĉe „Multlingva Eŭropo“ estis brilaĵoj de altaj kulturo kaj intelekto. Antaŭ ĉio oni povis ĝui tion ĉe Barbara Cassin (france), Tullio de Mauro (itale) kaj Jürgen Trabant (germane). La fajnaĵoj estis de multaj en la publiko „senpere“ registritaj. La aŭskultantoj estis ja lingvosciencistoj, ili povis jubili, jam antaŭ ol la tradukistoj povis rediri la ĵus aŭditan.

La deklaritaj celoj de ICI similas al tiuj de Esperanto: la kulturoj (usone: civilizations) troviĝas en neniiga reciproka batalo, kio fariĝis „kvazaŭ oficiala“ depost la libro „Clash of Civilizations (Karambolo de la Civilizacioj“).

ICI volas do esplori, kiel oni povas sukcese instigi la kulturojn al „paca kunagado“. ICI prezentas vastan gamon de tio, kio en la homa socio estu komprenata kiel kulturo. Pri tio esence okupiĝas delikatsentaj lingvosciencistoj.

Poste mi diskutis – ĉe glaso da vino kaj „antipasti“ – kun afabla lingvosciencistino. Kio vekis ŝian atenton? Kompreneble la demando „kio estas artefarita“? Mi eldiris la opinion, ke kantado estas natura, sed male la de 30000 jaroj tiel inĝenie konstruataj muzikinstrumentoj – ili ja estas terure artefaritaj. Kaj ke estas kvazaŭ neelteneble aŭskulti „muzikaĵojn“ ludatajn per tiaj intrumentoj. Jam la nigraj kaj blankaj klavoj de piano malkaŝas la artefaritan, mekanikan, krudmalmole nerondan, rekte maŝinecan karakteron de la piano.

Mia fina konkludo iomete pensigis ŝin: nu do, en la fajron kun la piano!

Philipp Sonntag